

DE NANZAN ĜIS NAMSAN

MÁRKUS Gábor

En ĉina lingvo ambaŭ vortoj videblas jene: 南山 kaj la signifo de tiuj ideogramoj estas “suda monteto”. El tiu vidpunkto do oni povus konkludi, ke vojaĝante de Nanzan ĝis Namsan okazis nenio, ĉar temas pri la samaj lokoj. Fakte Nanzan estas parto de japana urbo Nagoya kaj Namsan estas distrikto de Seulo, la korea ĉefurbo.

En mia vivo Nanzan-Universitato en urbo Nagoya estas tre grava loko, ĉar kiel hungara studento antaŭ tridek jaroj mi komencis konatiĝi kun la orientazia kulturo kaj kun la japana lingvo en tiu loko. Dum la komunisma periodo hungaroj, same kiel aliaj orienteŭropanoj vivis separate de la ekstera mondo kaj ordinaraj homoj havis nenian kontakton kun la kapitalismaj landoj. En 1982 okazis, ke mi, kiel malriĉa orienteŭropa studento sen mono en mia poŝo, sen kreditkarto alvenis al la jam tiam riĉa Japanio, parolante nek la anglan nek la japanan lingvojn kaj sciante nenion pri la ekonomia kaj socia situacio de Orienta Azio. Estas konate, ke dum la komunisma epoko rusa lingvo estis instruata en la orienteŭropaj landoj.

Tiam mi vivis en Japanio tre modeste, sed danke al la stipendio de Entrepreno Verda Stelo mi povis sukcese fini mian studprogramon en Nanzan-Universitato. Laŭ konsento

Ryokusei Kigyo Kabusiki Kaisha kovris miajn kostojn en Japanio sed mi devis aĉeti la vojaĝbileton inter Hungario kaj Japanio. Tiam la bileto por vojaĝi per aviadilo estis tro multekosta, do mi vojaĝis inter Budapeŝto kaj Nakhodka per trajno kaj inter Nakhodka kaj Yokohama per rusa ŝipo. Mi aĉetis la plej malmultekostan bileton por la ŝipo, tio ebligis al mi ricevi liton en la plej malkomforta sesakategoria ĉambro de la ŝipo. La afero komenciĝis tiel, sed en la haveno de Nakhodka la ŝipkapitano anoncis, ke estis nur malmultaj vojaĝantoj kaj li ne volis malfermi, lumigi, hejti kaj purigi ĉiujn ĉambrojn. Pro tio li ordonis, ke ĉiuj vojaĝantoj uzu unuaklasan ĉambron sendepende de la pagita sumo. Tiel okazis, ke mi alvenis al Yokohama en luksa ĉambro, kvankam mi aĉetis la plej malmultekostan bileton.

Antaŭ tridek jaroj, je la komenco de mia japana studprogramo mia sola kontakto al la orientazia socio estis mia kunlaboro kun la japana Esperanto-movado. Per la helpo de tiu kunlaboro mi povis atingi nekredoblan sukceson kaj povis konstrui mirinde sukcesan profesion karieron. Post la fino de mia studprogramo mi hejmenvojaĝis kaj konstruis tre viglajn internaciajn sciencajn kaj sociajn

kontaktojn inter diversaj eŭropaj kaj orientaziaj sciencaj, industriaj, komercaj kaj sociaj organizoj. Mi regule partoprenis konferencojn kaj kunvenojn en universitatoj kaj diversaj sociaj organizoj, kune tagmanĝis kun profesoroj kaj dekanoj, fondis komunan entreprenon kun posedantoj de alilandaj industriaj entreprenoj kaj verkis sukcesajn librojn en multaj lingvoj.

Resumante la rezultojn de mia scienca esplorprogramo en Nanzan-Universitato mi doktoriĝis en la Budapeŝta Ekonomika Universitato. La temo de mia doktora disertaĵo estis la analizo de la japana postmilita ekonomia evoluo. Poste mi fariĝis estro de la plej granda hungara industria korporacio kaj mi laboris kiel strategia manaĝero en la Hungara Nacia Petrola Korporacio. Post la politikaj ŝanĝoj en Orienta Eŭropo mi laboris por la hungara parlamenta

Kontrola kaj Aŭditora Oficejo kaj mia tasko estis kontroli la registaron. Mi analizis, ĉu ili agadis laŭ leĝo aŭ kontraŭ leĝo kaj ĉu ili elspezis monon el la nacia buĝeto laŭ leĝo aŭ kontraŭ leĝo. Krome, oni petis ke mi fariĝu ankaŭ redaktoro de la plej grava hungara komput-teknika periodaĵo, respondecante pri orientaziaj temoj. En mia profesia kariero en miaj ambaŭ laborejoj, do kaj en la Nacia Petrola Korporacio kaj en la parlamenta Kontrola kaj Aŭditora Oficejo mi regule uzis Esperanton por konstrui pli vastajn internaciajn rilatojn utilajn por miaj oficejoj. Pri miaj rezultoj en tiu faktereno mi publikigis artikolojn en la hungara ĉefministra organo kaj ankaŭ en la revuo de la Financa Ministrejo. Tiel evidentiĝis por la legantoj kaj ankaŭ por la estraro de niaj registaraj institucioj, ke je la fino de la dudeka jarcento Esperanto jam estis utila ilo por konstrui efikajn internaciajn sciencajn, fakajn, kulturajn kaj ekonomiajn rilatojn.

Dum la lastaj jaroj mi kutime pasigas kelkajn semajnojn aŭ monatojn en Seulo, proksime al Namsan. Tie troveblas la centro de la Seula Esperanto Kulturcentro, kies prezidanto Lee Jungkee estas docento de du koreaj universitatoj,



La aŭtoro kun prof-ro Mizuno Yoshiaki apud la rivero Blua Danubo kaj la hungara parlamentejo

instruante tie la internacian lingvon. Krom tiu laboro li regule organizas specialajn konferencojn por lingvistoj kaj lingvoinstruistoj kaj preparas diversajn kulturajn kaj religiajn renkontiĝojn. Dum la lastaj jaroj oni regule petis min prelegi en tiuj eventoj kaj ankaŭ tie mi sukcesis konstrui pli novajn kunlaborojn kun ĉinaj kaj japanaj universitatoj kaj sociosciencaj organizoj. Samtempe mi regule kunlaboras ankaŭ kun profesoroj de mia Nanzan-Universitato en Nagoya, same kiel kun la estraro de la Internacia Kongresa Universitato en la vjetnamia ĉefurbo en urbo Hanojo.

Pere de tiu vasta internacia kunlaboro mia vivo signife ŝanĝiĝis. Jam ne plu necesas por mi aĉeti la plej malmultekostan trajnbileton kaj mi tute libere povus rezervi ĉambron por mi en kvarstela aŭ kvinstela hotelo dum miaj alilandaj vojaĝoj. Malgraŭ tio mi preskaŭ neniam faras tion. Fakte mi jam al kutimiĝis al la modesta vivo kaj eĉ en mia nova situacio mi ne facile povas ŝanĝi mian kutiman modestan vivostilon. Vojaĝante en Japanio, Ĉinio kaj Koreio mi kun ĝojo konstatas, ke mi jam povas legi la skribaĵojn sur la muroj en tri lingvoj (foje eĉ en kvar lingvoj), do angle, japane, ĉine kaj koree. Kaj la plej grava rezulto por mi estas, ke mia taglibro estas plena kun internaciaj sciencaj kaj fakaj programoj, en kiuj mi estas petata

prelegi pri miaj spertoj en ekonomio, financa kontrolo, lingvistiko, religio kaj kulturo. Tiun sukceson mi atingis pere de mia studprogramo en Nanzan-Universitato, pere de mia kunlaboro kun gravaj ĉinaj universitatoj kaj akademioj kaj pere de la helpo de la internacia lingvo Esperanto. En 2013, en la jaro de la centa jubilea Japana Kongreso mi povas diri, ke la japana Esperanto-movado estas forta movado, la agado tie estas tre utila kaj mi persone dankas, ke pere de mia kunlaboro kun la japanaj esperantistaj organizoj grande riĉiĝis mia vivo kaj per tiu kunlaboro mi povis atingi gravajn sukcesojn en mia profesia kariero.

Nuntempe kelkaj ĵurnalistoj kritikas Esperanton, ke ĝi ne sukcesis fariĝi vera mondlingvo dum pli ol cent jaroj. Malgraŭ tio mi asertas, ke kvankam Esperanto ankoraŭ ne estas vera mondlingvo, sed la



Transdono de libro „Ruĝa suno kaj verda stelo” de la aŭtoro al prezidanto de Nanzan-Universitato

Pri la prelego

internacia Esperanto-movado jam ekzistas kaj en multaj landoj tre bone prosperas. Mi povas diri, ke esperanto havas ŝancon estiĝi vera mondskala interlingvo iam en la estonto. Se tio ne sukcesis dum la unuaj cent jaroj, estas ŝanco, ke tio realiĝu en la dua, aŭ en la tria centjara epoko. Same, kiel okazis en la historio de kristanismo. Je la komenco, kiam Jesuo Kristo fondis tiun novan religion, estis nur kelkcent homoj, kiuj apartenis al tiu komunumo. Eĉ cent jarojn post la fondo de tiu religio la kristana eklezio estis oficiale neakceptita movado en la tiam mondo. Sed en la unua parto de la kvara jarcento la situacio multe ŝanĝiĝis. Tiam Granda Konstantino, la romia imperiestro deklaris, ke kristanismo estu oficiale akceptita kaj poste ĝi fariĝis oficiala ŝtatrelegio en la tuta Romia Imperio. Poste ĝi estis la plej granda religia organizo en la okcidenta mondo kaj nuntempe jam 2.2 miliardoj da homoj, la triono de la homaro apartenas al la diversaj kristanaj eklezioj de la mondo. En la dudekunua jarcento jam preskaŭ la tuta homaro scias aŭ aŭdis ion pri la instruo de Jesuo Kristo.

Do, ni esperu, ke iam en la estonto la homaro komprenos, ke pro sia neŭtraleco, facileco kaj logika gramatiko esperanto povas esti taŭga komunikilo por fariĝi ĝenerale akceptita interlingvo en la tuta mondo.

Tiu ĉi verko de d-ro MÁRKUS Gábor estas la enhavo de la prelego, farita en la 15a de junio en Esperanto-Domo de JEI en Tokio, kun partopreno de 36 esperantistoj. La prelego okazis memore al la Esperanto-Tago en Japanio, la 12a de junio. Tiu tago rememorigas al ni la fondon de la 1-a Esperanto-Organizo en Japanio, la tiam Japania Esperantista Asocio, en la 12a de junio en 1906. (la redakcio)

(要約) ^{なんざん}南山は名古屋の南山大学、ナムサンは韓国のソウル市内の地名です。私は1982年に緑星企業の奨学金（故早稲田裕氏が提供）によりハンガリーから南山大学に留学しました。その成果をもとに「戦後日本の経済発展の分析」で博士号を得ました。そして、ハンガリーの国立石油公社や国会会計監査機構で要職を務め、その間にもエスペラントを活用しました。最近韓国のナムサンにあるソウルエスペラントセンターに滞在し、エスペラントを教えたりしています。このような経験ができたのもエスペラントのおかげです。（マールクシュ・ガーボル）

この講演について — 本講演はエスペラントの日記念講座として6月15日に東京のエスペラント会館で行われ、36名が参加しました。「エスペラントの日」は日本の組織的エスペラント活動が始まった1906年6月12日を記念したものです。（編集部）

❖ 赤い太陽と緑の星 マールクシュ・ガーボル、ハンガリー、2012年、156p. 日本語、エスペラント他、525円